# EKO 2013

Rekreita arĥivo de la ok postkongresaj komunikoj de la jaro, lanĉita sub la nomo 'Estraraj Komunikoj' kun la celoj subteni la landan agadon kaj la novan AMO-programon.

Sendita el Budapeŝto, la 29an de aŭgusto. Nur al LA pro la specifa temo. Vortoj: 350.

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne)

Karaj,

Mi skribas por memorigi vin pri la eblo frue arigi kaj transigi kotizojn por 2014 kaj postaj jaroj laŭ la nunaj tarifoj. Eble vi scias, ke la Komitato de UEA en Rejkjaviko akceptis malgrandan kreskon en la kotizoj. Temas pri altigo de 61 ĝis 63 eŭroj en la plenpreza kotizo en kategorio MA-T. Okazos pli-malpli proporciaj altigoj en aliaj kategorioj – foje ankaŭ kurzaj moviĝoj povos interveni. En septembro vi kaj viaj kotizperantoj ricevos la plenan laŭlandan tarifoliston, kiu aperos en la oktobra revuo *Esperanto*.

Ni atentigas vin: se vi arigas kaj transigas kotizojn antaŭ la 30a de septembro 2013, vi rajtas fari tion laŭ la nunaj tarifoj. Bonvolu informi vian kotizperanton pri tio, kaj, se vi deziras eluzi la eblon, kunlabori kun tiu peranto en la frua arigo de kotizoj.

Pri ajnaj administraj duboj au demandoj, bv. turni vin al la Centra Oficejo.

Jen alia pli interesa propono. UEA akceptos ĝis la fino de 2013 dumvivajn membrecojn laŭ la 25-oblo de la nunaj kotizoj MJ aŭ MA. Nur ekde la unua de januaro 2014 validos la 25-oblo de la novaj kotizoj. Kaptu do la okazon!

Estraranoj kaj la Centra Oficejo nun kunlaboras en la pretigo de varbiloj por la nova jaro; baldaŭ ili estos je via dispono. Simile ni kreos diversajn varbajn helpilojn – ĉu retajn, ĉu fizikajn. Plie, ni pretigos gvidilojn pri diversaj aspektoj de la varbado. Cele al tio, ni volonte ricevos gvidajn tekstojn aŭ raportojn pri tio, precipe el landoj, kie la varbado bone funkcias. Nia gvidilo estu ne nur teoria, sed inkluzivu kazo-studojn pri sukcesa praktiko.

Salutojn el tondrotumulta Budapeŝto. La ŝtormo migros orienten (same kiel mi), tiel ke ni reĝuu ĝin (kun konsiderinda interezo) en la rumanaj montaroj. Tie okazos ekde morgaŭ seminario de la rumana Landa Asocio (kunlabore kun la sekcio de ILEI); UEA prezentos sin en tiu aranĝo kaj plie ni markos (frue) la Mondan Tagon de Instruistoj, kiu okazos en la 5a de oktobro (vidu mian mesaĝon de la 12a de aŭgusto).

Kore salutas,

S. MacGill

Stefan MacGill
Vic-prezidanto de UEA

LA cirk 2013-08-29.doc

**Nova servo de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, lanĉita en julio 2013, kaj seninterrompe liverita depost tiam, per 264 komunikoj.**

ILEI